

# TEA-BULTENO

11<sup>a</sup> JARO

JANUARO - FEBRUARO 2008

NUMEROJ 1-2

Lingva diverseco estas unu el la plej grandaj plagoj de la vivo.

*François Marie Arouet, alidrite Voltaire (1694-1778)*

## *Kara Legantaro!*

Jen, alia jaro staras antaŭ ni, kiu en ĝojaj, feliĉigaj, fruktodonaj aŭ tu-cirkonstancoj, la te malaj, tio certe ne plene dependos de ni – foje, tro gravas la ĉirkaŭaj situacioj kiuj influas kaj kiujn kontraŭstari tute ne eblas. Kiel ajn, ni tamen daŭrigas laŭ la planoj difinitaj en la ĵus finiĝinta jaro. Sed ĉiam brulas eta flamo, malfacile estingebbla, kio igas nin esperi je pli bona estonteco. Kion ni esperu, ni esperantistoj? Ĉu ke finfine la homaro vekigu el sia longa dormemo kaj – ho, brila ideo! – kial ne apogi tiun revon esperantistan kaj puŝi amase ĉe registaroj, por ke nia lingvo estu enigita devige en ĉiujn lernejojn kaj, internacikunside, okazu nura interpretado de iu ajn nacia lingvo al esperanto kaj inverse? Ĉu je neatendita fina venko? Ho, ne, tute ne, ni estu realismaj, ni kontentiĝu je tiuj – eble por iuj tro sensignifaj sed por ni agantoj, male, tre valoraj – sukcesetoj, kiaj povas esti pozitiva rekono de nia agado flanke de lokaj instancoj, kontentigo de la asocioj pro iu aparte bona programo, ebla baldaŭa finpretigo de la historia libro “100 jaroj de Esperanto en Triesto”...

Ni ne tro postulas, nia deziro estas, ke Triesta Esperanto-Asocio plu ekzistu, sen tro da financaj problemoj pri sia vivtenado, ke oni ankoraŭ aŭdu paroli pri esperanto kiel solvo de lingva interkomunikado, ke nia rondo iĝu pli multnombra, ĉefe por plensukcese kune organizi la gravan eventon de la jaro 2009<sup>a</sup>, nome la 61<sup>an</sup> IFEF-kongreson (23-30 majo). Granda defio antaŭ ni: estas jam la momento por kune labori kaj prepari programon kiu devos esti longatempe memorebla por tiu kelkcento da fervojistoj-esperantistoj invititaj al niaj urbo kaj regiono. Eĉ malgrandaj faroj foje igas historion memorinda!

*Via redaktanto*

## FOR LA LIMOJNI

Grandaj, okkolumnaj titoloj unuapage sur ĵurnaloj.

### *Trieste senza più confini*


#### *La festa di Trieste, confine addio.*

Kaj ene, ĉiuspecaj artikoloj, vortfluemaj, eŭforiaj: pri memoraĵoj, festoj, kuriozaĵoj pro la «historia» okazintaĵo. Fakte, vere epokfara traĵo: Slovenio – kune kun aliaj ok orienteŭropaj landoj – eniras la Schengen-areon. Do, neni limstango staros antaŭ ni survoje al *Sezana*, antaŭ ili survoje al *Trieste*.

Vere ekas nova epoko kaj kiam falas limoj, ĉiam estas ĝojiga okazo: ĉar limo daŭre estas baro, obstaklo, malhelpo al homaj rilatoj ĉiu-ajn-cele: ĉu komerca, profesia, labora, persona. Distancoj ŝajne mallongiĝas pro malpli tempodaŭro de vojaĝo. Kaj eĉ veturado estas pli komforta pro manko de ia subtila timo: ĉar limo, kun siaj doganistoj, policistoj ĉiam kaj ĉiun iomete timigas, eĉ senkiale.

Sed...

Mi jam vidas sur samaj ĵurnaloj – post du/tri monatoj – artikolojn pri lokaj komercistoj plendantaj pro malkresko de vendoj, ĉar homoj preferas aĉetadon en la iam ĉelimaj slovenaj urbetoj pro pli favoraj prezoj. Kaj –



post ses/ok monatoj – denove kromaj artikoloj pri la ne plu translimaj homoj, plendantaj pro pliigo de varkostoj.

Eble iu povas taksi min pesimisma, sed tio estas nura pragmatismo: reko-

ni la normalajn leĝojn de merkato, kiu tamen iom post iom trovos la ĝustan ekvilibron kaj iamaniere stabiligos. Sed...

Ekzistas pliaj limoj. Enmensaj. Tiuj devenantaj el tradicioj, al moroj. Kelkaj el antaŭjuĝoj – *moglie e buoi dei paesi tuoi* = edziĝo najbara garantias el eraro. Tiuj naskitaj de timo al aliulo, al nekonato. De antaŭnelongaj malamoj aŭ eblaj ofendiĝoj, eĉ historie antikvaj.

Tiuj ĉi limoj kuŝas profunde en la animo de homoj kaj tre malfacile estas disbateblaj, ne sufiĉas leĝo aŭ traktato por ilin forfaligi.

Sed...

Ankaŭ tia forigo estas necesa. Ankaŭ tian disfalon ne eblas preterlasi. Alie, la ĵus forlimigita vojo similos al aleo ornamita per belegaj arboj sed plenplena de kavoj kaj ŝtonoj, kies traĵo estas peniga, se ne eĉ danĝera. Precipe por la amortiziloj de la aŭtomobiloj veturantaj laŭlonge vojon ŝajne mallongan.



Tia forigo estas tute nepra. Ĉar tiuj mensaj bariloj povas esti pli fortikaj ol la limstangoj, kiujn - ni vidis - rid-  
etantaj aŭtoritatuloj segis, kiujn nekonatoj kiel memor-  
aĵojn forrabis.

Eĉ se tiuj vojoj plenplenos de multokupituloj kaj  
laboremuloj, tiuj vojoj ne kunigos homojn kaj urbojn,  
ĉar nevideblaj limoj ilin ĉiam baros.

La mensaj limoj forfalas pro interkompreniĝo, toleremo,  
indulgo, reciproka eltenemo. Do, la samaj kondutoj  
necesaj por kunteni familion. Fakte, societo estas granda  
familio, kaj interpopolaj rilatoj tute similu al grandega  
familio por glate progresi nuntempe, kiam la vorto  
«tutmondigo» tiom nian buŝon plenigas.

Al tiu celo povas kontribui ankaŭ esperanto, se ni nur  
memoras la paroladon de Zamenhof dum la unua  
kongreso en 1905:

*«...en la gastamaj muroj de Bolonjo-sur-Marjo kunvenis  
ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj  
kun homoj.»*

Lingvo estas la plej fiera kaj nobla specialaĵo de homa  
identeco. Tiuj havantaj ĝin komuna ne nur bone  
interkompreniĝas sed ankaŭ kune identecas, eĉ se ĉiu  
havas sian propran karakteron.

Nur tra komuna identeco la mensaj bariloj povos fali.

Tion bone memoru. Ĉiam.

**VIGLO**

**S-ro Koïchiro Matsuura, Ĝenerala Direktoro de Unesko, publikigis mesaĝon pri la celebrado de la  
INTERNACIA JARO DE LINGVOJ – 2008  
En ĝi li skizas la ĉefajn idealojn kaj celojn de tiu speciala jaro, al kiu estos dediĉita ankaŭ  
la temo de la 93<sup>a</sup> Universala Kongreso de Esperanto en Roterdamo julie 2008.**

La jaro 2008 estas proklamita Internacia Jaro de Lingvoj fare de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj. UNESKO, al kiu oni konfidis la taskon kunordigi la agadon por la Jaro, pretas plenumi sian rolon kiel gvida aganto.

La Organizaĵo estas plene konscia pri la decida graveco de la lingvoj por la multaj defioj, kiujn la homaro devos al-  
fronti dum la venontaj jardekoj.

La lingvoj fakte estas nepraj por la identeco de la homaj grupoj kaj individuoj kaj por ilia paca konekzisto. Ili estas  
strategia faktoro por antaŭeniri al daŭropova evoluigo kaj harmonia rilato inter la tutmonda kaj la loka.

La lingvoj havas kernan gravecon por atingi la ses celojn de Edukado por Ĉiuj (EPĈ) kaj la Jarmilajn Evoluigajn Ce-  
lojn (JEC) aprobitajn de Unuiĝintaj Nacioj en 2000.

Kiel faktoro de socia integriĝo, la lingvoj ludas strategian rolon en la forigo de la ekstrema malriĉeco kaj malsato  
(JEC 1), dum, kiel kolonoj de alfabetiĝo kaj lernado de kapabloj por la vivo, ili estas ankaŭ nepraj por atingi universa-  
lan unuanivelan edukadon (JEC 2). La batalo kontraŭ HIV/aidoso, malario kaj aliaj malsanoj (JEC 6) devas utiligi la  
lingvojn de la koncernaj homgrupoj por trafi ilin, kaj la konservado de lokaj kaj indiĝenaj scioj kaj lertoj strebe al na-  
turmedia pluteneblo (JEC 7) estas kerne ligita al lokaj kaj indiĝenaj lingvoj.

Plie, la kultura diverseco estas intime ligita al la lingva diverseco, kiel indikite en la Universala Deklaracio pri Kultura  
Diverseco de UNESKO kaj ĝia Agoplano (2001), la Konvencio por la Konservado de la Nemateria Kultura Heredaĵo  
kaj la Konvencio pri la Protektado kaj Antaŭenigo de la Diverseco de la Kulturaj Esprimoj (2005).

Tamen, en la daŭro de kelkaj generacioj, pli ol 50% el la 7000 lingvoj parolataj en la mondo povos malaperi. Nun  
estas uzata malpli ol kvarono el ili en la lernejoj kaj ciberspaco, kaj la plimulton oni uzas nur sporade. Miloj da lingvoj  
— malgraŭ tio ke ĉiu estas regata de homgrupo kiu ĝin uzas kiel ĉiutagan komunikilon — forestas el la edukistemoj,  
komunikaj rimedoj, eldona industrio kaj ĝenerale el la publika sfero.

Urĝas agi. Kiel? Per la kuraĝigo kaj prilaboro de lingvopolitikoj ebligantaj al ĉiu lingvokomunumo la uzon de ties  
gepatra lingvo kiel eble plej vaste kaj ofte, ankaŭ en la edukado, apud la rego de iu nacia aŭ regiona lingvo kaj iu in-  
ternacia lingvo. Ankaŭ kuraĝigante la parolantojn de regantaj lingvoj regi alian nacian aŭ regionan lingvon kaj unu aŭ  
du internaciajn lingvojn. Nur se plurlingvismo estos plene akceptita, ĉiuj lingvoj povos trovi sian lokon en nia tutmon-  
diĝinta mondo.

Tial UNESKO invitas la registarojn, UN-organojn, organizaĵojn de la civila socio, edukajn instituciojn, asociojn de pro-  
fesiuloj kaj ĉiujn aliajn koncernatojn stimuli la respekton, antaŭenigon kaj protektadon de ĉiuj lingvoj, aparte de tiuj  
endanĝerigitaj, en ĉiuj situacioj de la individua kaj kolektiva vivoj.

Ĉu per iniciatoj sur la eduka kampo, la ciberspaco aŭ la klera medio; ĉu per projektoj por savtenado de endanĝerigitaj  
lingvoj aŭ antaŭenigo de la lingvoj kiel iloj de socia integriĝo; aŭ per esplorado de la interrilato inter la lingvoj kaj la  
ekonomio, inter la lingvoj kaj scioj de la indiĝenoj aŭ inter la lingvoj kaj la kreado, estas necese ke la ideo “lingvoj  
gravas!” estu diskonigata ĉie.

Tiukuntekste, la 21<sup>a</sup> de februaro kiel dato de la naŭa Internacia Tago de la Gepatra Lingvo havos elstaran signifon kaj  
estos aparte taŭga limdato por la enkonduko de iniciatoj celantaj antaŭenigon de lingvoj.

Nia komuna celo estas atingi agnoskon, sur la nacia, regiona kaj internacia niveloj, pri la graveco de la lingva divers-  
eco kaj plurlingvismo en la eduka, administra kaj jura sistemoj, en la kulturaj esprimoj kaj komunikaj iloj, en la ciber-  
spaco kaj komerco.

La Internacia Jaro de Lingvoj 2008 alportos unikan ŝancon por fari decidan antaŭeniron survoje al la atingo de tiuj  
celoj.

*(Fonto: el UEA-ejo)*



## Triesto kaŝita

## La du elstaraj pensiuloj

Ĉiuj triestanoj konas *Miches* [Mikec - Mikaelo] kaj *Jachez* [Jakec - Jakobo], la du famajn paĝiojn kiuj, jam de pli ol unu jarcento, sonoras ĉiun horon desur la turo de la urbodomo.

Ne konatas la origino de iliaj nomoj: certas tamen, ke la pasintjarcentaj ŝercemuloj ne povis perdi okazon eltrovi tiun signifan nomon por la du gravuloj.

La du statuoj el zinko estis projektitaj de arkitekto Giuseppe Bruni en 1873 kaj mudlitaj, post du jaroj, de skulptisto Fausto Asteo el *Ceneda*, docento ĉe la Arta Akademio en Venecio.


Surloke oni starigis ilin inter la 5<sup>a</sup> kaj 7<sup>a</sup> de januaro 1876, kaj ili oficiale eklaboris, batante la dekduan horon, je la sekva 14<sup>a</sup> de januaro. Aŭtomate funkciantaj, Mikec kaj Jakec havis artikintajn brakojn, kiuj ekmoviĝis pro horloĝa mekanismo, sekve de kio unu levis martelon kaj batis ĉiuhore, dum ĉiu kvaronhoro estis sonorita per la alia.

En 1972, la du originalaj aŭtomatoj – tro eluzitaj de vetero kaj “laborpenado” – estis “klonitaj” kaj ambaŭ anstataŭigitaj per tiuj tutegalaj kopioj. La triesta komunumo dekretis do, la pensiigon de Mikec kaj Jakec kaj ilin translokigis ĉe iu deponejo en strato *Papiniano*, kie dum jaroj ili kuŝis, polvokovritaj, apud tiu sonorilo kiu per sia batsonorado informis la urbocentran loĝantaron pri la tempopaso.

Mikec kaj Jakec apartenas al la triestano, ili eniris ĝiajn vivkutimojn, tiel en la estanteo kiel en la tre fora pasinteco. El sia privilegia situo ili spektis la plej gravajn eventojn de la urbo, la iridentistajn manifestaciojn, tiujn maraspektajn amaskunvenojn, estis minacitaj per bomboj kaj kanonpafadoj, ploris pro surstrataj sangoverŝadoj, ĝojis pro la gloraj momentoj. Dum jaroj kaj jaroj ili rigardadis la urbanaron dum ĝia dimanĉa parado... kaj eĉ la tutan urbon observis, kiam ĝi, foje, kvankam disdividita inter du malsamaj opini-grupoj, tamen ĉiam sentoplene estis ligita al sia “Urbodomo”.

Sed kie ili nun?

Bele restaŭritaj en 2005, Mikec kaj Jakec estas nun gastigitaj de la Urba Muzeo pri Historio kaj Arto (sur la monteto Sankta Justo, apud la Katedralo), kie ili povos ripozi post sia pli ol centjara, honesta kaj akurata laborado pinte de la Urbodoma Palaco.



*Nova rubriko en TEA-Bulteno, al kiu ĉiu povas kontribui. Mi ŝatus ricevi fabelon tipan de via loĝloko, kiun vi mem aŭdis el la buŝo de viaj patrino aŭ geavoj, kiun ankoraŭ nun vi rakontas al gefiloj aŭ genepoj, kiu plibeligas vian infanan vivon kaj revigis vin pri estonteco en magia mondo!*

### Rakontu al mi fabelon... PARADIZO KAJ INFERO (el Ĉinio)

Post longa kaj kuraĝa vivo, brava samurajo alvenis al paradizo. Li estis tre scivolema kaj petis rapide trarigardi ankaŭ inferon: anĝelo kontentigis lin. Li troviĝis en vastega salono, havanta en la centro tablon, preparitan per pladoj plenplenaj de bongustaĵoj. Sed la kunmangantoj, cirkaŭe sidantaj, estis ĉiuj skeletaj, mortkoloraj kaj malfortiĝintaj. «Kiel eblas, fronte de tia abundaĵo?» demandis la samurajo. La anĝelo klarigis: «Por enbuŝigi la mangaĵon, ili disponas pri unu metron longaj mangiloj, kiujn oni rigore devas preni nur je la ekstremaĵoj». Tute tremanta de tiu terura puno, li petis tuj iri al paradizo.

Kun maksimuma miro, li trovis tute identan salonon, sennombrajn homojn sidantajn cirkaŭ longa tablo, egalan vicon da delikataĵoj kaj same longajn mangilojn ĉe la ekstremaĵo prenendajn. Male, la samtabloj estis ridetantaj, gajaj kaj bone nutritaj. «Kiel eblas?» li demandis la anĝelon. Kaj tiu respondis: «En la infero, ĉiu ŝtreĉiĝas kapti la mangaĵon por ĝin mangi, samkiel li dum sia tuta vivo ĉiam faris. Kontraŭe, ĉi tie ĉiu prenas ĝin per la mangiloj kaj enbuŝigas la najbaron».

Paradizo kaj infero estas en viaj propraj manoj.

Jam nun.

### Literatura Konkurso “Renato Pennazio”

Esperanto Centro Torino, memore de sia asociano Renato Pennazio, antaŭ nelonge mortinta, lanĉas literaturan konkurson titolitan:

#### Esperanto: ŝanco por eksterordinaraj renkontoj

Konkursa regularo:

- ★ Oni rajtas partopreni per novelo aŭ mallonga rakonto esperantlingva, kun maksimuma amplekso de 5 paĝoj (ĉiu paĝo konsistu el 30 linioj).
- ★ La ellaboraĵojn oni sendu, triekzemplere, en fermita koverto antaŭ la 31<sup>a</sup> de marto 2008 al: Rosanna Perottino, Via Alfano 1, It-10154 Torino.
- ★ Ĉiuj ellaboraĵoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo kaj neniam antaŭe publikigitaj.

- ★ En alia fermita koverto estu enmetitaj la aŭtoraj donitaĵoj: persona kaj familia nomoj, adreso, telefonnumero kaj adreso de elektronika poŝto.
- ★ Eblas sendi la tekstojn eĉ rete al: [zorion99@libero.it](mailto:zorion99@libero.it). Ĉikaze, la sekretario garantios la anonimecon.
- ★ Ĵurio konsistos el tri torinaj esperantistoj.
- ★ Estos premiitaj 3 el la plej bonaj verkistoj kaj la premio konsistos el senpaga aliĝo al la ĉijara Itala Kongreso de Esperanto, plus publikigo de la rakontoj ĉe la kutimaj Esperanto-kanaloj.
- ★ Al la elektitaj kaj publikigitaj verkoj ne rekonatas aŭtorrajtoj. Laŭ la leĝo rilatanta la personajn donitaĵojn, oni certigas pri ties traktado nur por celoj de ĉi tiu konkurso.



Tiel mi kuiras!

Kaj vi?

## TRIESTA JOTA

Ĉiu ajn loka kuirarto estas “filo” de la popolo, tial ĉiam estas interese, krom gustumi la specifajn pladojn, ankaŭ iom ekscii pri ties deveno.

Nun mi prezentas al vi la supon *Jota* [jota] kiun prefere oni manĝas dumvintre: do, ĝuste en tiu ĉi periodo.

Estas diraĵo en Triesto, laŭ kiu, se iam *jota* ne plu ekzistos, tiam eĉ ne triestanoj ekzistos! Laŭ diversaj aŭtoroj ties nomo devenas aŭ el terminoj cimbra (*voj*), aŭ malnov-latina (*jutta*), el irlanda (*it*), aŭ eĉ eble el ĉeĥa (*jucha*). Entute temas pri plado tre komuna, ofte surtabligita, tiom ke la vorto *jota*, ankoraŭ nuntempe, estas uzata kun la signifo de “manĝo abunda”.

Ŝajnas, ke la origino de tiu ĉi supo estas ĝuste triesta, malgraŭ ke kaj slovenoj kaj friulanoj kontraŭdiras tiun aserton kaj pretendas la aŭtoran rajton. Ĝi estas fama tra la tuta regiono kaj, laŭ la diversaj kutimoj, oni aldonas al ĝi sian apartan “spicon”, kvazaŭ por pravigi sian aŭtorcon. Tial eblas gustumi *Jota*-n kun acidaj rapoj, kun maisa faruno, laŭ karsta maniero kun hordeo k.a. Sed jen al vi la originala recepto:

### INGREDIENCOJ POR 4 PERSONOJ

- 300 g sekigitaj fazeoloj (brunaj)
- 300 g acida brasiko
- 1 laŭra folio
- 2 ajleroj, dispremitaj
- 2 mezgrandaj terpomoj
- 1 kulero da olivoleo
- 1 ajlero (por la fritetaĵo)
- 2 kuleroj da faruno
- salo kaj pipro, laŭbezono



### PREPARADO

Trempadu la fazeolojn tutan nokton en malvarma akvo. Metu ilin en poton kun malvarma, sensala akvo kune kun la laŭra folio kaj la dispremitaj ajleroj. Kuiradu ĝis ilia moliĝo.

Intertempe, metu iom da olivoleo en alia kaserolo, aldonu la acidan brasikon, salu, surmetu kovrilon kaj kuiretu je tre milda varmeco. De tempo al tempo miksetu, zorgante ke la brasiko ne tro sekiĝu aŭ adheru al la kaserolo. Se bezonate, aldonu iom da varma akvo.

Post ĉirkaŭ unu horo/unu horo kaj duono, kaj brasiko kaj fazeoloj estos elkuiritaj. Tiam en pato varmigu la oleon, enmetu ajleron hakitan, ĝin blondigu: tiam enmetu la du kulerojn da faruno, kaj daŭre miksante, ĝin brunetigu.

Post tio enverŝu la preparitaĵon en la poton kun la fazeoloj. Aldonu je ĉi punkto ankaŭ la kuiritan brasikon kaj la terpomojn, senŝeligitajn sed ne dispecigitajn, iom da salo, laŭ via gusto, kaj finkuiru je malalta varmeco.

Fine, elprenu la terpomojn, kaj ilin kaĉigu; post tio denove ilin enmetu en la *jota*-n. Preferindas, ke ĉi tiun pladon, tre varman, oni surtabligu la postan tagon.

Por fari el ĝi kompletan pladon, oni povas aldoni pecon da ŝinko, aŭ kolbasetojn aŭ fumaĵitajn porkripetojn.

Bonan apetiton!

## Januara Programo

2 - merkredo	<b>10h40 - Rai Uno</b> , ĉe la televidprogramo “10’ pri...”, intervjuo kun FEI rilate al “Esperanto kaj Eŭropunio”. Ĉeestos d-ro <i>Giorgio Novello</i> , Ambasadato Konsilisto (ĉe Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj) kaj docento pri internaci-rilata metodiko, ĉe Universitatoj de <i>Trieste</i> kaj <i>Gorizia</i>
4 - vendredo	<b>16h30</b> - Salono “ <i>Primo Rovis</i> ” - <i>Via Ginnastica 47</i> - Prezento de Esperanto 20h00 - <b>Tombolo premioriaĉa</b>
8- mardo	<b>12h45</b> - Radio TSA (slovenlingve) - Intervjuo kun... 20h00 - IFEF-Kongreso 2009: La libro pri triestaj itineroj
11 - vendredo	20h00 - Gramatikaj problemoj
<b>13 - dimanĉo</b>	<b>10h00 - Jara Asembleo de TEA</b>
15 - mardo	<b>14h00</b> - Radio UNO - Vivospertoj kun esperanto 20h00 - Sidejaj laboroj
18 - vendredo	20h00 - Teatraĵo pri “Amikejo” Esperanto-Ŝtato en neŭtrala Moresnet
22 - mardo	20h00 - Verboj, prefiksoj, prepozicioj
25 - vendredo	20h00 - <i>Lecturae Dantis</i> esperante, itale, triestadialekte
29 - mardo	20h00 - Teatraj legaĵoj

## Februara Programo

1 - vendredo	20h00 - IFEF-Kongreso 2009
5 - mardo	<b>12h4</b> - Radio TSA - Eventoj en Triesto 20h00 - Enigmoj en Esperanto
8 - vendredo	20h00 - Gramatikaj problemoj
12 - mardo	20h00 - IFEF-Kongreso 2009: programo
15 - vendredo	20h00 - IFEF-Kongreso 2009: labormaterialoj
19 - mardo	20h00 - IFEF-Kongreso 2009: ekskursoj
22 - vendredo	<b>20h00 - Monda Tago de la Gepatra Lingvo</b>
26 - mardo	20h00 - Trafoliumado de esperanta gazetaro: el LA GAZETO
29 - vendredo	20h00 - La ĉijara IFEF-Kongreso en Pollando: kiuj al Poznan? Informoj, interkonsentoj...

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com

Sidejo: Via Coroneo 15 - 34133 Trieste

tel/fakso: +39 040 763128

Reto: esperantotrieste@yahoo.it; noredv@tele2.it

Grupa tft-ejo://it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatristina

Poŝta adreso: CP 601 Trieste Centro IT-34101 Trieste - Italio

Poŝtekkonto N° 10834349





### Okazas en Triesto!

### Kido sanigas

Ĉimatene, irante laŭ la Granda Kanalo, mi preterpasis du sencerbuletojn kaj aŭdis unu el la du, diri al la alia.

- Hej, Joĉjo, kio egalas, en eŭroj: «eĉ ne UNU lireton mi havas»?

Tuja respondo:

- Sed kion vi diraĉas, Tonĉjo? Ĉu vi plenstultiĝis? Simplas: «eĉ ne unu eŭron mi havas»

Kaj la alia:

- Ĉuuu?? Nu, tio signifas, ke mi estas EGE malriĉa. Mi opiniis, ke tio egalas al nur duona milono.....?!?

### La deveno de la judoj

Rivka (Rebbeka): "Panjo, de kie devenas la juda popolo?"

Panjo: "Ni ĉiuj devenas de Adamo kaj Evo, kiuj naskis infanojn kaj kies posteulo estis Abrahamo. Li estis la prapatro de nia popolo juda."

Post kelkaj tagoj Rivka diras al paĉjo:


"Paĉjo, de kie devenas la judoj?"

Paĉjo: "En la komenco estis simioj, de kiuj devenas la homoj. La homoj dividiĝis en popolojn kaj samamane naskiĝis la judoj antaŭ kelkaj jarmiloj."

Rivka estis nun tre konfuzita kaj tuj iris al sia patrino:

"Panjo, paĉjo diras ke ni devenas de la simioj. Kial vi diris al mi ion alian?"

Panjo: "Filino kara, mi rakontis al vi pri mia familio kaj ne pri la familio de via patro."



### Ŝuldo *Ne helpas plendo nek ploro kontraŭ kreditoro (Zamenhof)*

Iun vesperon, judo vizitas la Rabenon Levi en lia hejmo en Brooklyn, Novjorko. "Pardonu min pro la malfrua horo, sed mi opinias ke vi devas ekscii pri la problemoj kiuj trafas viajn komunumanojn."

Rabeno: "Bonvolu rakonti kio okazis!"

Judo: "S-ino Goldman, la malriĉa eksedzino, ŝuldas 1,000 dolarojn, sed ne havas la monon por repagi. Pro tio oni forpelis ŝin de la hejmo, ŝi malsaniĝis kaj tute ne povas nutri siajn infanojn."

Rabeno: "Terura afero! Mi tre dankas vin pro la informoj. Mi tuj agos por kolekti la monon. Mi mem donacos al ŝi 50 dolarojn el mia poŝo. Sed diru al mi, amiko mia: ĉu vi estas parenco de s-ino Goldman?"

Judo: "Ne, tute ne. Mi estas la kreditoro."

### Ĉe kanibaloj

Kanibalino vidas, ke ŝia najbarino kuiras ion en granda kaserolo.

Kanibalino B: "Mia edzo ĉasis du dikajn judojn kaj mi preparas nun supon per ili."


Kanibalino A: "Atentu bone, karulino. Lastan fojon kiam mi metis tiajn homojn en la kaserolon, ĝis kiam ili kuiriĝis, ili elmanĝis la tutan terpomaron!"

Fonto: nova listo de abo(me)nantoj de judaj humuraĵoj.

## Ludoj, ŝercoj, enigmoj...

Solvo de la ludoj aperintaj en la novembra-decembra TEA-Bulteno:

- 1 Ĉu fantomo? ETA BETA;
- 2 Matematika Kvizo:  $72-60+4-6=10$ ;  $1 \times 9+2-6+5=10$ ;  $45:10 \times 2+1=10$ ;
- 3 Administrejestro; 4 Kruelega tirano: LA GILOTINO





# ORDINARA JARA ASEMBLEO DE TEA

La Ĝenerala Asembleo de la membroj de TEA okazos **dimanĉon la 13<sup>an</sup> de januaro 2008 je la 10h00 en unua kunvoko kaj respektive je la 10h30 en dua kunvoko**. Ĉi lasta validos kun kiu ajn nombro de partoprenantoj.

## TAGORDO

1. Elekto de la prezidanto kaj sekretario de la Asembleo.
2. Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa jarkunveno.
3. Raportoj pri la agado dum la jaro 2007:
  - a) Morala raporto de la prezidanto (*Edvige Ackermann*)
  - b) Agadraporto de la sekretario (*Elda Doerfler*)
  - c) Financa kaj bilanca raporto de la kasisto (*Giuseppe Valle*)
  - ĉ) Raporto pri la libro-fako (*Giuseppe Valle*)
  - d) Deklaracio de la revizoroj (*Amalia Zerpini - Elio Nocent*)
  - e) Raporto de la triesta katedro (*Elda Doerfler*)
4. Elekto de la balot-komisiono.
5. Voĉdonado por la elekto de estraranoj kaj revizoroj.
6. Diversaĵoj (pritraktotaj dum kontrolo de la balotiloj).
7. Anonco de la rezultoj de la voĉdonado.

## DELEGILO

La asociano \_\_\_\_\_

estas delegita anstataŭi min ĉe la Jara Asembleo de TEA, okazonta dimanĉon  
la 13<sup>an</sup> de januaro 2008.

Subskribo \_\_\_\_\_

Dato \_\_\_\_\_

**Notu bone!** Okaze de la Asembleo eblos pagi al la kasisto la renovigojn de TEA-kotizo, FEL-kaj UEA-membrecoj, abonojn al diversaj ĵurnaloj kaj revuoj, aliĝon al UK ktp ktp. La sekretario peras abon-pagojn de LA GAZETO kaj membro-kotizojn de ELF-AREK (Esperanto-Ligo Filatelista—Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj).